

HAKIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 85 - 1973

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



MANOJN KAJ MENSJOJN NI BEZONAS



ENHAVO

Notoj.....	1
La naskiĝantaj p.....	2-3
Krioj de l'mizero.....	4-5
Plia jaro pasis.....	5
Hommedio.....	6-7
Nia premiita artikolo....	8
Marista vivo.....	9-10
TEJO, nia tutmonda organizo.	11
Mafalda.....	12

NOTOJ

-----Studenta Esperanto Klubo de Zagreb eldonas interesan revuon: Jes, sed.... Gi aperas 8-foje en la jaro kaj celas havi ĉiulande abonantojn kaj kunlaborantoj per artikoloj. Jara abono: 7 germanaj markoj, al ĝirkonto de Tišljar Kruno

306-620-1004-3220-51297/96

—L jubljanska banka, ZAGREB

-----Ni jam havas aliĝilojn por la venonta IJK okazonta en Münster.
Se vi deziras partopreni, mendu ilin ĉe ni.

LA ESTRARO

La naskiĝantaj poetoj de Esperanto

Pastro Adrian Zulueta S.J. antikva esperantisto. Li loĝas ĉe la monaĥejo de Loyola. Pastro Zulueta multe ĝojas kiam li havas okazon paroli kun esperantistoj. Hodiaŭ la parolado temas pri la unuaj poetoj de la lingvo. Li estas ege entuziasma al la poezio. Liaj vortoj : la poezio estas la floro de la lingvoj kaj la poetoj la magoj de ĝia beleco. Li vicas:

- 1) Zamenhof Lazaro Ludoviko (1859-1917). Elpensinto kaj unua poeto de la internacia lingvo. En lia unua libro pri esperanto "Internacia Lingvo" eldonita ruslingve en la jaro 1887 jam aperas tri poeziaĵoj kiel montraĵo pri ĝia kapablo esprimi la belecon.
- 2) Zamenhof Felikso (1868-1921). Frato de Lazaro. Kiam li estis deknaŭjara montris al sia frato siajn unuajn versaĵojn. Dum lia tuta vivo li verkis esperantan literaturon.
- 3) Belmont Leono (Blumental) (1865-1941). Pola verkisto kaj elparolisto. Li beligis la esperantan lingvon per mildaj poeziaĵoj.
- 4) Grabowski Antono (1857-1921). Pola inĝeniero kaj poligloto li konis proksimume 30 lingvojn. Li verkis multegajn kaj elegantajn poeziaĵojn, tiel ke li estas nomata "Patro de la Esperantista Poezio". Li eldonis la unuan poezian antologion en nia lingvo "La Liro de la esperantoj".
- 5) Dombrowski Alejandro (1860-1938). Katolika litova pastro.
- 6) Devjatnin Basilio (1862-1938). Rusa literaturisto. Inter aliaj li verkis la poemon "La nevola mortiginto" kaj gajnis la unuan literaturan premion en la VII*-Kongreso Internacia, Amberes 1911.

7) Lorenz Vladimiro (1872-1957). Li estis la lasta inter la poetoj de la unuaj tempoj. Li estis - grandega lingvisto kaj komprenis proksimume 80 lingvojn kaj regis pli ol 20 el la plej gravaj.

Al tiuj gloraj poetoj ni povas dediĉi la versojn de Rubén Darío :

....jam venas Venkintoj;
jam venas Venkintoj, jam sonas la helaj trum
petoj.....

Sed ankoraŭ restas malplenaj lokoj por meti en ili la bildojn de niaj junaĵaj poetoj.

Multe pli parolis Pastro Zulueta, sed bedaŭrinde ni ne povas meti liajn interesajn vortojn ĉar en nia - modesta revuo mankas spaco. Mi adiaŭis lin , promesante viziti lin denove kiel plej eble baldaŭ.

Dankon al la Pastro Zulueta pro lia simpatio kaj - ofero al nia gazeto.

MIAU

REGIONA KUNVENO EN LAREDO

La 18an de novembro okazis HEJĜ-kunveno por la membroj de Bilbao kaj Santander. Oni ne povas paroli pri sukceso rilate la nombron de partoprenintoj: du santanderanoj kaj 17 bilbaanoj (ne ĉiuj esperantistoj), kelkaj el ili lernantoj. 3

Malgraŭ tio, Esperanto estis aŭskultita en longdaŭra kaj akresona diskutado.

Krioj de l' mizero

(daŭrigo)

Al brusto ilin prenu
por unu foja kiso
kaj el la lipoj prenu
viruso de la ftizo.

Kaj poste, se vi povas
min drasu per la vipo
ĝis kiam min mi movas
kaj mortos ve sur lipoj
sed ne prediku ordon
nek juston de l'socio
kaj ŝparu nuran vorton
pri helpa man'de Dio.

MIN drasu ĝis mortfalo
sufiĉas jam la luktoj
ĉar mia vivregalo
nur estas verm'el fruktoj.

Plenumu vian arton
ĝi, ĉiam vin amuzas
se, doni rajtan parton
el vivo vi rifuzas.

Sed faru tuj la taskon
kaj finu sen hezito
ĉar ŝiros mi la maskon
de vi, ho hipokrito !.

Kaj pentros sen kompato
sur mia pala vango
la rozojn de l'vanĝbato
per via propra sango.

JOSE

Plia jaro pasis

Plia jaro pasis. HEJS travivis dum ĝi kelkajn spertojn, kiuj certe ne signifis sukceson por Esperanto kaj la vigleco de nia sekcio.

La estraro lanĉis iniciatojn kiuj ne atingis respondon aŭ kies rezulto estis malpli esperiga ol antaŭvidite. Jes, komence de la jaro, ni kunvokis konkurson pri artikoloj por nia bulteno.

En ĉi tiu numero ni publikigas la premiitan artikolon, kiu per siaj malmultaj vortoj vidigas la kunlaboremon de nia membraro. La alia iniciato, varbado de novaj membroj, malgraŭ ke ĝi ne atingis la celon (100 novajn membrojn), iomete plinombrigis nian sekcion. Sed, por kiu ?, ĉu por ricevo de dumnata bulteno nur foje legata kaj kie nur areto da laborantoj partoprenas ?.

Ni ja deziras al nia sekcio por la nova jaro veran viglecon per ĉies kunlaboremo.

LA ESTRARO

hommedio

./...

(daŭrigo)

Tiu studo, post rememoro de la gravaj okazintaĵoj de Donora (Pensylvania, Usono), (1948), - Londono (5-9 decembro 1952^a) Los Angeles (Usono) (1955), - kaj ties amasaj mortoj, analizas la diversajn faktorojn de urba malpurigo kaj la rilaton de tiuj faktoroj kun la topografio, la klimato kaj la urba ordigo.



Ĝi studas ankaŭ la influojn sur la sano kaj la sociekonomiajn implicojn. Poste, ni trovas studon de ĉiu el la menciitaj urboj.

Kaj el tiuj referaĵoj mi tradukis por vi la raporton pri "la enfluejo de Bilbao", por mi pli bone konata.

" Ne estas nova la problemo de Bilbao. Ne nur estas la urbo kiu prezentas la plej altan indicon de atmosfera malpurigo en nia lando (kune kun la apudaj urbetoj), sed ke la ĝenerala degrado de vivmedio (ni devus fari gravan substrekon pri la malpurigo de la riveroj el la industriaj nordaj basenoj : la rivero Oriz estas unu el la plej malpuraj el la mondo) estas priokupiginda.

Okazas ke unu kondiĉanto de la industria-bilbao-a elstareco, la katalizigila funkcio de homoj kaj maŝinoj kiu estas plenokupinta la enfluejon de la rivero Nervión iĝas kontraŭ si mem, ĉar

./...



Kongresnumero

26-a KONGRESO DE INTERNACIA FERVOJISTA
ESPERANTO-FEDERACIO

de la 11-a ĝis la 17-a de majo 1974

TARRAGONA (Hispanio)

Konstanta adreso: 26-a Esperanto-Kongreso I.F.E.F.

Ronda S. Antonio 46/50, 2.^a, 4.^a

Barcelono-11 (Hispanio)

Bankkonto: Banco Central-Agencia 19. Avenida José Antonio, 780. Barcelona-13
(Konto 3538/50 26-a Esperanto-Kongreso I.F.E.F.)

ALIGILO

Mi aliĝas al la 26-a I.F.E.F.-Kongreso en Tarragona
S-ro/S-ino/F-ino (nepre forstrekta nekonvenan)

Familia nomo

Antaŭnomo

Profesio

Naskiĝjaro

Strato, n-ro

Poŝta gvidnumero

Loĝloko

Provinco

Lando

samtempe aliĝas per aparta aliĝilo

Edz (in) o

Naskiĝjaro

Infano (j)

Naskiĝjaro

Samtempe mi enpagos al la supre menciita bankkonto:

	ĝis 31.1.74	ĝis 17.4.74	pagenda sumo
	Pesetoj	Pesetoj	
ĜRESKOTIZOJ			
a) Kongresano	<input type="checkbox"/> 600	<input type="checkbox"/> 800
b) Familianoj, pensiuloj, gejunuloj vis 20 jaraj pae la duonon	<input type="checkbox"/> 300	<input type="checkbox"/> 400
c) Bankota aliĝo (samtempe)	<input type="checkbox"/> 100	<input type="checkbox"/> 100
HOTELKONTRAKTO			
Por la periodo de tranoktebleco per lito	<input type="checkbox"/> 35	<input type="checkbox"/> 35
Kongresa banketo	<input type="checkbox"/> 350	<input type="checkbox"/> 350
ELSKURSOJ			
Duontaga ekskurso al S. Pau de Ordal	<input type="checkbox"/> 100	<input type="checkbox"/> 100
B) Duontaga ekskurso al Sitges	<input type="checkbox"/> 75	<input type="checkbox"/> 75
C) Duontaga ekskurso al Tortosa	<input type="checkbox"/> 150	<input type="checkbox"/> 150
D) Tuttaga ekskurso al Montserrat	<input type="checkbox"/> 500	<input type="checkbox"/> 500

INSTRUKCIOJ

- 1) Devas ĉiu partoprenanto nepre plenigi apartan aliĝilon.
Kiu ne havas aliĝilon, uzu samformatan paperon.
- 2) Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare, tajpe aŭ preslitere.
- 3) Sendu la aliĝilon al la konstanta adreso; la pagon al la indikita bankkonto.
- 4) Se vi deziras aliĝi, sed ne scias detalojn rilate al loĝado, tiam fortranĉu la aliĝilon kaj sendu loĝejmendilon pli poste.
- 5) Aliĝilo estos traktata nur post ricevo de la pago.
- 6) Pagante por alia persono, bonvolu sendi apartan aliĝilon, menciante klare la celon de la pago kaj indikante la kompletan adreson de la koncerna persono.
- 7) La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la kongreson. Antaŭpagita sumo por loĝado estos repagebla post depreno de 10 % por administraj kostoj, kondiĉe ke L.K.K. ricevos la malmendon de la aliĝinto ĝis la 15-a de aprilo 1974.
- 8) Mendoj por loĝado alvenintaj post la 15-a de aprilo 1974 estos traktataj sen garantio.
- 9) Kongreskarto estos legitimilo. Bonvolu nepre kunporti ĝin. Oni ne rajtas fordoni, vendi aŭ interŝanĝi ĝin.
- 10) Bonvolu noti en via propra intereso, kion vi mendis kaj pagis.
- 11) Per alsendo de la kongreskarto LKK konfirmas la ricevon de viaj aliĝo kaj pago.
- 12) Mencio de alvenhoru necesas por LKK, ĉefe por konstati, kiom da personoj alvenos en Tarragona per noktaj trajnoj.
- 13) Por plenumi dum la ekskursoj ĉiujn planitajn vizitojn, oni petas la partoprenantojn sufiĉe frue enaŭtobusiĝi, ĉar la aŭtobusoj startos akurate ĉe la kongresejo.
- 14) Akceptejo situos en la stacidomo de Tarragona. Sekvu la informilojn kaj montrilojn videblajn sur la peronoj de la stacio.
Ankaŭ en la stacio de Barcelono-Termino funkcios kongresinformejo la 10-an kaj 11-an de majo (je la 10 h. ĝis la 24 h.).

Kongresnumero

26-a IFEF - Kongreso. TARRAGONA

Mendilo pri loĝado

Familia nomo: (S-ro/S-ino/F-ino)

Antaŭnomo

Mi deziras loĝi kune kun s-ro, s-ino, f-ino:

HOTELPREZOJ (po persono)

Kategorio	Ŭnulita ĉambro		Dulita ĉambro	
	Nura tranoktejo (A)	Kompleta pensiono (B)	Nura tranoktejo (C)	Kompleta pensiono (D)
1-a	560	1070	450	960
2-a	300	630	250	580
3-a	200	470	180	450
4-a	150	410	125	385
5-a	100	300	85	285
6-a	septaga loĝado en la kongresejo			1500

Mi mendas litojn en kategorio. [] por jenaj noktoj:

10/11; 11/12; 12/13; 13/14; 14/15; 15/16; 16/17; 17/18.

Bonvolu skribi la kategorion, kiu respondas al viaj deziroj.

La hoteloj de ni rezervitaj estas proksime de la maro aŭ en proksimeco de la kongresejo. La prezoj estas po persono kaj inkluzivas servomonon kaj turistan takson.

En la kategorio estas du-tri lita ĉambro en ferio-dometoj; ĝi postulas kompletan pensionon dum la kongressemajno. La nombro da litoj en tiu kategorio estas limigita.

Se unulita ĉambroj ne plu estas je dispono, mi konsentas loĝi kun alia kongresano en dulita ĉambro, kiel eble samkategoria.

Se hotelo en la dezirata prezklaso ne plu estas disponebla, mi konsentas loĝi en pli aŭ malpli multekosta hotelo, diferenco nur maksimume en unu prezklaso.

En la turbo kaj en proksimeco de la kongresejo elzistas nutramonbraj restoracioj en kiuj eblas manĝi laŭ viaj deziroj.

Mi alvenos la (datohoro) subskribo

PROVIZORA PROGRAMO

- Vendredo 10/5 Kunsido I.K.K. — IFEF-estraro
Gazetara konferenco
- Sabato 11/5 Akcepto de kongresanoj
Interkona vespero
- Dimanĉo 12/5 Ekumena diservo
Solena malfermo
Komuna fotografado
Urba rondveturado kaj inaŭguro de Esperanto-Muzeo
Folkloro Vespero
- Lundo 13/5 Kunsido estraro — Komitato (ne publika)
Kunsido estraro — Komitato (publika)
Kunsido de fakaj komisionoj
Fakprelego kaj filmprezentado
Kongresa bankedo kaj Internacia balo
- Mardo 14/5 Kunsido de fakaj komisionoj
Akcepto fare de la urbestro
Posttagmeza ekskurso
Arta Vespero
- Merkredo 15/5 Unua plenkunsido
Posttagmeza ekskurso
Forumo
- Ĵaŭdo 16/5 Dua plenkunsido
Junulara vespero
- Vendredo 17/5 Tutotaga ekskurso kaj fermo de la kongreso dum la
tagmanĝo
- Sabato 18/5 Ekveturo per rezervita vagonaro al Barcelono
Postkongresa programo

restas ankaŭ homoj kaj maŝinoj enfermitaj en mal-
 larĝa vâlo kien estas enverŝataj la poluciaj agen-
 toj de la plej grava industria amasigo de la lan-
 do.

Meteorologie, kvankam pluvas multe,
 okazita la fenomeno de meĥanika balao de la akvaj
 gutoj en sia falo planken, restas atmosfero malse-
 kece ŝargata kies alvo reakcios kun ĉiuj anhidri-
 doj kiuj baldaŭ alvenos devenantaj el la indus-
 trioj de la valo formante acidojn tre danĝerajn.

Fine, temas pri ekstrema okazo de in-
 dustria polucio" .

JUAN AZCUENAGA


(Santander)

HUMORA

Angulo




WATER-CLOSED
 GATE



OTTON

(El "Anaitasuna")



OTTON

Nia premiita artikolo

Jes, ĉi tiu estas la neskribita artikolo de ne
konata aŭtoro kiu atingis la unuan premion. Pro manko
da spaco ni ne publikigas la 2-kaj 3^on premiojn.

Hontinde !!!

Marista

VIVO

Melodio laŭ:
"Jop hej di"

longatempe sur la mar, jop hej di, jop hej da
sopiranta al la bar, jop hej di, hej da.
veda vivo de l'marist`
ankaŭ de l'ŝipmaŝinist`.

Jop hej di, hej di, hej da, jop hej di, jop hej da!
Jop hej di, hej di, hej da, jop hej di, jop hej da !.



Surteriĝas nun la band, jop....
Kompatinda ĉarma land, jop....
Laŭtbruantaj pro l'ŝovaĝ`
Venas ni el nia kaĝ`.
Jop hej di,

Dum en poŝo tintas or, jop hej....
Laŭte krias gaja ĥor, jop hej.....
Pretaj estas ni al ĝoj`
Danĝerega nia voj`.
Jop hej di

./.

En unua gastej, jop hej.....
La soifon grandan plej - jop hej...
Ni estingas dum diboĉ`
Ne aŭdante pri l`riproĉ`.
Jop hej di

Amopreta la k nabin, jop hej.....
Karesanta estas "lin", jop hej...
Surgenuo sidas ŝi .
Jen marista idili`.
Jop hej di

Baldaŭ elĉerpiĝas mon, jop hej.....
Laca estas la person`, jop hej
Sipeniras ĝoje ni,
Tre feliĉaj pro l`ebri`.
Jop hej di

Jen marista romantik, jop hej
Sklavlaboro kaj l`efik` jop hej.....
Altnivela homa viv`,
Altiranta perspektiv`.
Jop hej di

Kai Henriksen

TEJO *nia tutmonda* organizo

Laŭ vi scias, H.E.J.S. estas landa sekcio de la Internacia Junulara Organizo, T.E.J.O.

Nun, T.E.J.O. lanĉis varbkampanjon por plinombrigi la membraron kaj tiel atingi pligrandan efikon en sia grava poresperanta laborado.

La aliĝo al Tejo signifas emo partopreni en la esperanta movado laŭ ĝia vera senco, t.e. tutmonde, kunlabori en la sama organizo kun ĉiulandaj gejunuloj.

Santempe, la aliĝo al Tejo aldonas profiton, ĉar ĉiu membro povas utili la servojn de la organizo, nome: Turisma Servo, kiu informas pri la multaj kaj variaj ferioj en junulara "Esperantujo", ferioj en labortendaroj, per kiuj vi povas, krom gajni nomon per laboro en vinberejoj, ŝosejoj ktp. spertikamaradecon kun samaĝaj gejunuloj el diversaj landoj.

Pasporta Servo, kiu faciligas gastadon ĉe familioj de junaj esperantistoj.

Reto de junularaj delegitoj, kiuj helpas la vojaĝantan junulon en franda lando.

Krome, laŭ vi jam scias, ĉiuj Tejo-membroj ricevas la interesan revuon "Kontakto'n", kiu esperantlingve pri traktas la plej interesajn problemojn de la junularo kaj de la tuta nova mondo.


Ciujare Tejo aranĝas la Internacian Junularan Kongreson, la plej grava kunveno de junaj geesperantistoj el la tuta mondo kiuj diskutas pri gravaj temoj kaj gaje kunvivadas dum la kongresa semajno.

Do, aliĝu al Tejo, via tutmonda organizo.

Asier

MAFAJDA

DE QUINO



01 MAFJDA-2. Eldonejo LUMEN
Barcelono/Hispanio

Trad.: Atjkus Bukis